

19-~~X~~-1955

- PARIS -  
★ T.E.J.O. ★  
JEUNESSE ESPERANTISTE

Estimata Sinjoro Cseh!

Mi petas vin publikigi mian raporton  
kaj ankau (el la mono lasita de mi Ze vi)

1) penci 24 + 6 stelojn (abono 1956 + brikoj)

2) Sendi ekvivalenton de 5 U.S. dolaroj

al "Esperanto-Propaganda Centro,

(1175) Casella Postale 1175, Milano, Italujo",

por mendi la novan eldonon de "Plena

poŝta  
ĉekkonto: Gramatiko" (Waringhena, Kalo esay).

3/10262,

Milano

3) Informi min pri la ekzakta sumo (en  
steloj), kiun mi devonis Ze vi.

4) Sendi al mi jenajn librojn el via katalogo:

Esperanto 60-jara (<sup>bindo</sup> broŝ.), Interlingvistiko

kaj Esperantologio, ~~la gramatika karek-~~

~~tero de la radikoj~~, Al Toronto, Inferio,

La 4 eldonajojn de "Stafeto", La

Granda aventuro (broŝ.) handoj del'

fantazio, <sup>bindo</sup> La vila mano, Se grenereto.

Se restas ankoraŭ sufiĉe da mono, ankau:

~~Dekdu poŝtoj~~, Tra l'silento, Batalo pri

la domo Hei Kkila, Bengalaj fabdoj, Du amasantaj  
noveloj, Du Majstronoveloj, Elektitaj noveloj  
de L. Baekelmans; La Radianta Lotuso, La  
Sendingvilo, Sen Fratoj (kart.) [ha 3 lastaj  
antaŭ la aliaj; se mankas iu malmulto,  
vi poros gin peti de s-ro T. Jung, ĉe kiu  
mi lasis 14.50 gld.].

Antaŭan dankon!

-9 DEC. 1955

Sincere Paul Ciliga

Estrarano kaj

Peranto de T. E. J. O. en Parizo  
(Respondeculo pri la Propagando).

Bonvolu antaŭ aperigi jenan informon en la Rubriko  
"Kion faras la Liganoj" :- P. Ciliga, AM de UL en  
Parizo, vojaĝis en Nederlando, ĉar li estis laŭreato de la  
Delaire-Konkurso. Li varme dankas la familion, kiu  
gastigis lin. Poste li foriris en Italujon, kie li ĉeestis  
la 40-an U.K. kaj la 11-an J. J.-K. de T. E. J. O., kies  
jarkunveno elektis lin Estrarano (Respondeculo pri  
la Propagando). —

AL ESP.-PROPAGANDA CENTRO, Milano.

Hago, 22-X-1955.

Estimataj samideanoj!

Ni sciigas vin, ke s-ro Paul CILIGA (17 rue Duguay-Trouin, Paris 6, Francujo) pagis al ni por vi la sumon de 5.-- usonaj dolaroj= 76.-- steloj por mendi la novan eldonon de PLENA GRAMATIKO de Kalocsay-Warinhien.

La sumon de 76.-- steloj ni notis en via konto kre-dite kaj ĝi estas je via dispono. Bonvolu informi nin, ĉu vi deziras elpagon aŭ preferas uzi ĝin por viaj eventualaj mendoj ĉe nia Instituto.

Atendante vian respondon ni restas  
kun samideana saluto,

9-XII-1955.

Al s-ro Paul CILIGA,

Parizo.

Kara samideano!

Vian leteron de la 19-X kaj vian poŝtkarton de la 27-X siatempe ni bone ricevis. Kiel vi vidis en La Praktiko, ni publikigis la informojn. Pri la TEJO-kunveno ni ricevis detalan raporton de s-ro Minnaja.

Vian mendon ni plenumis kaj ni forsendis al vi en kvar paketoj la sekvantajn:

1 ESPERANTO 60-JARA broŝ.		5.20 st.
1 INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO		9.--
1 AL TORENTO		6.40
1 KVAROPO		22.--
1 LA BAPTO DE CARO VLADIMIR		22.--
1 EL LA MANIKO		26.40
1 KOKO KRIAS JAM		26.40
1 LA GRANDA AVENTURO broŝ.		20.80
1 LANDOJ DE FANTAZIO bindita		19.20
1 LA VILA MANO		13.60
1 SE GRENERETO broŝurita		4.80
1 LA BATALO PRI LA DOMO HEIKKILÄ		1.90
1 BENGALAJ FABELOJ		3.20
1 DU AMOSENTAJ NOVELOJ		8.20
1 DU MAJSTRONVELOJ bindita		8.40
1 ELEKTITAJ NOVELOJ de Baekelmans		4.40
1 LA SENLINGVULO bindita		11.60
1 SEP PRATOJ kartonita		33.--
		<u>246.50</u>

1 INFERIO	13.--	
1 TRA L' SILENTO	2.40	
1 LA RADIANTA LOTUSO	10.--	
	<u>25.40</u>	
Rabato 10 % pro antaŭpago	2.54	
	<u>22.86</u>	

		<u>22.86</u>
Afranko de la kvar paketoj 3.15 guld. =		269.36
		<u>12.60</u>
		281.96
Al UL kotizo 1956 24 + 6 st.		30.--
Al Esp.Prop.Centro, Milano 5.-- \$ =		<u>76.--</u>
		387.96
Vi pagis kontante 75.-- guld. =		<u>300.--</u>
Restas en via konto kiel ŝuldo .....		87.96 st.

87.96 steloj = 2199 frankoj, kiun sumon vi povas sendi al s-ro A. Labit, Lille. Vi povas pagi ankaŭ per nederlanda mono, la sumo estas 21.99 guldenoj. Kun koraj bondeziroj kaj saluto,



ESPERANTO

JEUNESSE ESPERANTISTE

★ T.E.J.O. ★

— PARIS —

ESPERANTO  
LINGVO INTERNACIA  
DOCUMENTATION COMPLÈTE CHEZ  
PAUL CILIGA  
17, RUE DUGUAY-TRUIN, PARIS-VI

Parizo, la 26-an  
de Oktobro 1956

Tre Estimata Sinjoro!

Mi petas vin esprimi en "La  
Praktiko", rubriko "Kion Faras la  
Liganoj" la jenan informon:

x x x

S-ro Paul Ciliga, AM de UL, Fakdelegito  
de UEA por Junularo, elektigis en Kopenhago  
estrarano de Tutmonda Esperantista  
Junulara Organizo (la tiam fondita  
junulara sekcio de UEA). Li estas komisiita  
por rilati kun ne-Esperantistaj organi-  
zaĵoj kaj i.a. daŭre ~~kontaktas~~ kontaktas  
kun  
la "Mondcivitana Centro", 55 rue  
Lacépède, Paris I, kies respondeculoj  
entuziasme favoras Esperanton.

x x x

P. S. Mi baldaŭ sendas al vi raporton  
pri la Konstituciiga Asembleo  
de l' Mondcivitana Respubliko,  
kiu okazis en la Pac-Templo  
(Cardiff - Kimrujo - 27-30 VIII. 56)  
kaj pri la lingvaj malfacilaĵoj  
tie spertitaj.

La fondinto, Dro Hugh Schonfield,  
S. Litt., 30 Woodlane, Highgate,  
London N. 6. menciis en unu  
el siaj tiaj (anglalingvaj) paroladoj  
la nankoj de komuna lingvo  
por la civitanoj de l' Respubliko  
de tiu kreita. Tial, eble vi povos  
sendi al li, en la nomo de U. L.,  
kelkajn utilajn dokumentojn kaj  
numeron de "La Praktiko". Estu  
tute grave, se ni sukcesus komplete  
esperantistigi tiun progreseman  
"Respublikon". Esperanto devas  
esti antaŭ ĉio je la servo de l' pu-  
bliko, - kaj nome de la mondciitanoj.

Kun sinceraj salutoj

via Paul Ciliga

Union Espérantiste Française

34, Rue de Chabrol - PARIS (10<sup>e</sup>)

Tél. : PRO. 55-03

20.3.57

Tout homme doit savoir deux langues :  
celle de son pays et l'Espéranto

Tre Estimata  
Sinjoro!

Hodiaŭ mi havis  
la okazon intere-  
sigi al Esperanto  
la Redaktoron de  
grava ĵurnalo  
semajna "Jeune  
Europe". Ili estas  
ĉe tiu momento  
pretaj aperigi



Estimata Sinjoro

Andreo Ĉe

Universala Ligo

Riouwstraat 172

Den Haag

Nederlando

CARTE POSTALE

informojn pri la temo Eŭropo-Esperanto, sed tre ŝatus, ke la esp-ista gazetaro publiku ankau artikolojn pri eŭropaj problemoj. Tial mi proponis mian kunlaboradon: mi povus traduki en E-n artikolon ekz.-e pri la "Komuna Merkato", kondiĉe ke ĝi estu bone skribita kaj interesa. En la Revuo "La Praktiko" povus presi tian skribadon, kaj eventuale ankau aliajn, pri temoj interesaj por eŭropa esperantistaro?

Kun salutaj atendoj via respondon, via  
Paul Gilga



S-ro P. Ciliga  
Parizo.

-no. 21-3-1957

Estimata Samideano,

Ni denke ricevis vian kartonon de la 20-a de marto.  
Ni regule ricevas la ĵurnalon "Jeune Europe" kaj  
estas tre utile, se ili akceptus novaĵojn pri  
Esperanto.

Ni estas pretaj publikigi kelkfoje artikolon pri  
eŭropaj problemoj, sed ni devas esti singardej.  
Kiel vi scias, ni laboras nur por mondfederalismo,  
kvenkam ni vidas la grandan utilon por de unuigite  
Eŭropo. Ĉiam ekzistas temo la danĝero, ke ĝi fari-  
ĝu nova bloko. Sed pri la komuna merkato laŭ ni  
ne estas danĝero publikigi ĝin, se ĝi estas interesa  
artikolo, ne tro seka.

Estas dua danĝero, nome por nia lingvo. Ni devas  
esti trege singardej, ke la grande publiko ne ricevu  
ricevos la impreson, ke Esperanto estas ŝaĝo nur  
por Eŭropo. Ni deŭre devas insisti, ke Esperanto

estas-mondlingvó, kon-  
treste kun ekzemple  
Interlingue, pri kiuj <sup>la</sup>  
anoj mem diras, ke ĝi  
estas destinita nur por  
Eŭropo.  
Ni esperas, ke vi komprene-  
nes niaj konsiderojn  
kaj agos laŭ tio.

Kun sinceraj salutoj,  
S-ro Paul Gilg  
samideano  
p/e Union Espérantiste  
Franceise  
34 Rue de Chabrol  
PARIS 10<sup>e</sup>  
Frankrijk

P. Ciliga,  
17, rue Duguay-  
Trouin  
Paris VI

Union Espérantiste Française

34, Rue de Chabrol - PARIS (10<sup>e</sup>)

Tél. : PRO. 55-03

C. C. P. 855-35 Paris

Tout homme doit savoir deux langues :  
celle de son pays et l'Espéranto

PARIS X  
20H30  
27-3  
1957  
10F



Parizo, la 27-an/1147957.

Estimata Sinjorino!

Dankon pro via poŝtkarto;  
mi ĝojas vidi, ke via vidpunk-  
to plene akordiĝas kun  
la mia; mi informis "Jeune  
Europe", ke mi estas favora  
al paca Eŭropo, sed ne  
al ajna militismo. La  
artikolo mi deziris in-  
formi kaj agrablan,

Ae Sinjorino  
Julia Isbrücker  
Oostduinlaan 32  
Den Haag

Nederlando

Aun unu aŭ du fotoj. Mi informis la Ĉefredakto-  
ron, ke ni devas esti senpartiaj, sed povas pre-  
zenti problemon. Kiel vi scias, cetere, la "ko-  
muna Markato" kaj "Euratomo" estis aprobitaj  
en Romo antaŭ kelkaj tagoj. En la "ceŭropaj"  
gazetoj, mi ĉefe volas prezenti la uzon de Espe-  
ranto ĉe niĝaj kongresoj k.t.p. kie oni organizis  
eŭropan kunvenon aŭ vesperon. Ni diros "Lin-  
gvo internacia", ne nur por Eŭropo, sed por la  
tuta mondo; tio estas avantaĝo por ni ĉe la  
"ceŭropanoj" kaj ne fortimigos la aliajn. Pri la  
Fuŝprojektoj ĉi ne devas aperi 1 vorto. Ni devas  
insisti pri la uzo, la utiligo de Esperanto por  
krei efektive internacian komunumon. *Kiam salubri  
Paul C. Lige*

Parizo, la 10. IV. '57

Estimata Sinjorino!

Mi vizitis la Ĉefredaktoron de "Jenne Europe". Li akcepti kiel por-esperanta rubrikon en sia ĵurnalo, ĉar "Franca E-isto" havas ankau eŭropan paĝon.

Mi parolis kun Lucien Laurent koncerne la "blokon". Li certigis, ke tiu danĝero ne ekzistas.

Jen do kion mi proponas al la "Praktiko": resumi (mallongigi) la artikolojn, kiuj aperis en "Jenne Eur." pri la Komunista Merkato kaj la Transmaraj Teritorioj, traduki <sup>ilin</sup> en E-on kaj aperigi ilin (se eble kun fotoj en "La Praktiko". Ĉu mia plano saĝas al vi akceptebla aŭ ĉu vi havas eventuale alian proponon? salutas, via Paul Ciliza

CARTE POSTALE

Union Espérantiste Française

34, Rue de Chabrol - PARIS (10<sup>e</sup>)

Tel.: PRO. 55-03

C. C. P. 855-35 Paris

Tout homme doit savoir deux langues:  
celle de son pays et l'Espéranto



Bonvolu, mi tre petas  
in, skribi al mia  
hejmadreso.

17, rue Duguay-Trouin  
Paris IX<sup>e</sup>.

Antaŭan Dankon!

Ae sinjorino  
Julia Isbauer  
Wassenaarseweg 11c

Den Haag

Nederlando

# UNION ESPÉRANTISTE FRANÇAISE

FONDÉE EN 1898

BUREAUX OUVERTS  
TOUS LES JOURS  
de 9 h. à 12 h. et de 14 h. à 18 h.  
sauf DIMANCHES et MARDIS

SIÈGE SOCIAL :  
34, RUE DE CHABROL  
PARIS (10<sup>E</sup>)

TÉL. PRO. 55-03  
MÉTRO : GARE DE L'EST  
C. C. P. PARIS 855.35

Parizo, la 3-an de Junio 1957.

Estimata Sinjoro!

antaŭ kelke da tempo mi skribis al s-ino Isbrücker, petante ŝin akcepti la enpreson de Esperantlingva artikolo tradukita el "Jeune Europe" pri la Komuna Merkato kaj Transmaraj Teritorioj. Bedaŭrinde ĝis nun mi ne ricevis respondon, do mi turnas min al vi por peti vian decidon, ĉar mi devas doni respondon al ~~via~~ la ĉefredaktoro de tiu gazeto; tiam li akceptos enpresajn informojn pri esperanto kaj diversaj esperantistaj pri- aŭ por-eŭropoj manifestacioj, kunvenoj ks.

Krom tio mi petas vin bonvoli aperigi la jenan informon en la rubriko "Kion faras la Liganoj": ~~la Franca Esperanto-Instituto~~

~~--La Franca Esperanto-Instituto aljuĝis al AM de UL en Parizo, Paul CILIGA, la Diplomon pri Kapableco kun cito "tre bone". Tiu Estrarano de TEJO, komisiita por eksteraj rilatoj, riprezentos la Esperantistan Junularon dum la VI<sup>o</sup> Tutmonda Festivalo ~~en Moskvo~~ de Junularo kaj Studentoj (Moskvo, 28-7 ĝis 11-8, 1957) ~~kune kun sia kolego Ben Van Moorst kaj multe da aliaj esperantistoj~~ *kune kun sia kolego Ben Van Moorst kaj multe da aliaj junaj esperantistoj.*~~

Kompreneble se pro teĥnika kaŭzo tiu informo ne povos aperi ANTAŬ la Festivalo, bonvolu forstreki la koncernan frazon; ĉiukaze mi sendos koncizan raporton.

Post Moskvo mi intencas veturi al la Internacia Studenta Centro en Hald, Viborg, Danlando. Tie mi esperas prelegi pri nia lingvo, movado kaj literaturo.

*La 5-an de junio  
mi sendis al vi  
la kopiojn de  
mia respondoj  
de 13-4-'57*

Sincere salutas vin,

*Paul Ciliga*



ESPERANTO

ESPERANTO  
LINGVO INTERNACIA  
DOCUMENTATION COMPLETE CHEZ  
PAUL CILIGA  
17, RUE DUGUAY-TRQUIN, PARIS-VI

Parizo, 6/VII/57

Estimata Sinjorino!

Mi ricevis viajn leterojn...  
sed ĉiam ne havas respondojn  
al mia demando. Jam la  
trian fojon vi ripetis al mi  
la saman frazon. Kiam vi  
finfine komprenos, ke mi  
devas doni precizan res-  
pondojn al la redaktoro de  
"Jenne Europe"? Ĉu mi  
devas veturi al Hago por inter-  
paroli por ti?

Sajnas al mi, ke vi tute ne  
legis mian peton. Ĝetere mi  
fariĝis al sro (seh).  
Tenas ne "de tempo al



tempo", nek pri malinteresaj  
aŭ sekaj artikoloj, sed pri  
1 (unu) preciza, granda,  
plurpaĝa (eble aperigota  
en du numeroj) esperanta  
traduko, farita de ni mem,  
Diplomita pri Kapableco de  
la Franca Esperanto - Instituto  
kun cito "le bon" - ~~de~~  
du artikoj JAM

"aperintaj en Jeune Europe  
pri la Komuna Merkato, kaj  
la Transmaraj Teritorioj.

N<sup>o</sup> 86, 15 jan. 57, pp. 6-7  
N<sup>o</sup> 90, 15 marto 57, pp. 6-7  
ambau reviziitaj, por esti gisdataj.

Ne kredis, ke sen grandaj arti-  
koloj pri eŭropfederalismaj demandoj  
poros aperi io pri Esperanto en "J. Eur."  
Sincere, Paul Celiza

stfziflvio si ne nststavea emitu ntoluget si ivreao oaserejti  
si ubrege en tpeo tsand kas totelst tsiv ek toq, obstsllirrejtai  
.loreinsm tsburk si orq noitsqmts

eb" igitfiduq oesetery sin irq redxrdel oni-a 17-VI-1957  
ovdesa aitate, omelidoriq sgoxne si irq ntotelofokitrs "oqmej la oqmet  
ouvey si uo": VZEL-III-OS si eb otkaktacq siv ne obnsmes siv eb

uskns sfsntndve tsak, nofapirriAlnstotopau  
"forstefitnsrege sgoxne toq tsaserejni tomej irq, ntsils  
-itks sbnibul siiv toq esitsebnod tm nobnoqeser msifazisebnetA  
Estimata samideano!  
,ensebimsa niv estulsa tsx ooev

Responde je via letero de la 6-VI mi povas sciigi vin, ke la  
proponitan artikolon el Jeune Europe ni povos publikigi en la  
Praktiko aŭ: (1) la tutan en unu numero sur 4 paĝoj, aŭ: (2) en  
du numeroj sur po 2-3 paĝoj, la bildojn enkalkulite. Ĉar la ori-  
ginalo en la du n-roj de J.E. estas multe pli ampleksa, necesas  
fari multe mallongigitan resumon. La teksto devas esti skribita  
per maŝino, sur unu flanko de la papero kaj kun interspacoj in-  
ter la linioj.

Por la ilustrado bonvolu peti de J.E. la klišojn de la bil-  
doj prunte. Ne ĉiujn, ĉar ni bezonas por unu paĝo nur unu kli-  
ŝon pli grandan aŭ du malgrandajn.

Ni mem ne povas fari klišojn pro la altaj kostoj. La mi-  
nimuma kosto de unu klišo estas 48 steloj.

Mi miras pri la malĝentileco de via lasta skribaĵo al s-ino  
Isbrucker, kaj mi sentas, ke mi devas vin admoni, en via propra

./.





ESPERANTO

ESPERANTO  
LINGVO INTERNACIA  
DOCUMENTATION COMPLÈTE CHEZ  
PAUL CILIGA  
17, RUE DUGUAY-TROUIN, PARIS-VI\*

Parizo, la 3-an de  
Majo 1958

Estimata Samideano!

Mi esperas, ke vi bonorde ricevis la  
transpagon de mia dumviva kotizo, kiun  
mi siatempe pagis al la Peranto de U.L.  
en Francujo laŭ la nova kurzo de la stelo.  
Mi estas tre dankema al vi, se vi povus  
sendi al mi dumvivan membrokarton,  
laŭ la modelo de tiu, kiun havas ekz-e  
s-ano G. Fournier. Aliflanke, bonvolu no-  
te ke ĝis nun alvenis ĉe mi nur la ja-  
nuara N<sup>o</sup> de "La Praktiko". Ĉu vi  
povus sendigi la ceterajn de ĉi tiu jaro?

Krome, saĝas utila al mi la ekspreso  
de la jenaj informoj en la rubrikon "Ki-  
on faras la Ligoj?" :

- En la Geologia ~~Amfiteatro~~ de l' Sorbono  
(Pariza Universitato), kunveno de la Espe-

rantista Grupo, s-ano Paul Ciliga, DAM  
de UL, dufoje ~~per~~ partoprenis en triper-  
sona raporto pri la Moskva Festivalo  
kaj la vivo en Sovjetunio. Li bedaŭris,  
ke la cirkonstancoj ne ebligas tie la ek-  
ziston de organizita movado.

Plie li faris du prilingvajn prelegojn.  
"La franca salato, aŭ la miksiteco de la  
franca lingvo" montris, ke nacia lingvo  
ĉiam troviĝas en kontakto kun najba-  
roj kaj ne formiĝas izolate; "Kritikaj  
rimarkoj pri la ~~la~~ internacia vorttre-  
zoro kaj ties utiligo en Esperanto" pruvis,  
ke internacia lingvo iĝis ~~strebata~~ <sup>kaj</sup> necesa <sup>ĉi</sup>el-  
nus pro la diverĝa evoluo de la origine  
tre similaj hindo-eŭropaj dialektoj, unuflanke,  
kaj pro la kreo de komuna terminolo-  
gio sur bazo ĉefe grek-latina, aliflanke. -

Esperante, ke la plenumo de miaj  
petoj estos ebla,

mi salutas vin sincere

via

Paul Ciliga

Al s-ro P. CILIGA, Parizo.

Hago, 14-V-1958.

Kara samideano!

Ricevinte vian leteron de la 3-V ni faris esploron pri via DAM-igo kaj konstatis la sekvantajn: vian pagon de 500 steloj ni enskribis la 1-an de marto, kaj en la unua semajno de marto ni sendis al vi la januaran numeron de La Praktiko kun enmetita blukolora paperalipo, ĉi sur kiu estis niaj dankvortoj pro via subteno per la DAM-eco, kaj al kiu estis gluita travidebla koverteto entenananta la flavkoloran glukvitanceton, engluotan en vian membrokarton anstataŭ la ĝisnunaj jarkvitancetoj. Eble vi ne rimarkis tiun aldonon al la gazeto. Bonvolu do rekontroli la numeron!

La DAM-oj ne ricevas novan membrokarton, nur la flavan glukvitanceton engluotan. Se la sendita glukvitanceto efektive perdiĝis, ni volonte sendos al vi novan post via sciigo.

Gratulon pro via bonega aktiveco! La informojn ni uzos por la gazeto.

Kun koraj bondeziroj kaj amika saluto,

PS. Nian administranton trafis gravega trafikakcidento. Tial niaj malfruigoj.



ESPERANTO

Parizo, 17/V/1958

Estimata Samideano!

Dankon pro alsendo de februara "praktiko". Hieraŭ mi eksciis de S-ino J. Fayot, ke ankoraŭ ŝi ricevis ĝis nun, kiel mi, nur la januara N-on. Nun mi konas la kaŭzon, kaj tial petas vin transdoni plej sincerajn bondeziraĵojn por kompleta resaniĝo al via administranto.

DAMpaperslipon mi siatempe ricevis kaj la kvitancon mi algluis, sed nun ankoraŭ mi jaĝas vidi de S-ro G. Fournier apartan (malgrandan)

DAMkarton. Ĉu tiu ne plu ekzistas? aŭ eble ĝi estas por FM?

Nun pri alia afero. S-ro J. Thierry, prezidanto de nia pariza grupo, -same kiel mi, cetere, -deziras partopreni kaj TEJO-kunvenon, kaj

Ĉe-metodan seminarion. Bedaŭrinde  
la datoj kolizias. Li do partoprenos  
nur la unuajn tagojn en Homburg-  
Saar. Sed al mi tio ne eblas, en Ko-  
penhago mi akceptigis de la TEJO-  
Estraro, ke miaj Int. Kunvenoj okazu  
antaŭ la U.K., por ke mi povu de-  
~~o~~ unu vojaĝi al alia. Nur mi  
rimarkas, ke kelkaj partoprenun-  
toj elektas alian arangon, pro  
manko de "ubikveco". S-ro Thierry su-  
gestis al mi la eblecon estonte oka-  
zigi Ĉe-kurson dum la I. J. K. de TEJO;  
ŝajnas, ke tio tre utilis ĵal ellaj instruon-  
toj, kiuj bezonas kuragigon aŭ instigon-  
2) al - bedaŭrinde - multaj t. n. Komencan-  
toj, kiuj precipe el Germanujo inundas  
niajn arangojn. Mi petas vin pripens-  
eblecon de komuna arango en 1959 en loko  
difinita (probable en Germanujo aŭ Pollando);  
en Homburg mi tiel povos prezenti pro-  
ponon pri pozitiva laboro (la "movado"  
tro ofte estas dormado), kiu povos konkrete  
plifortigi la pozicion de Esperanto inter  
ties amikoj kaj simpatiantoj.

sincere salutas, via Paul Ciliga



28-5-1958

ne Markus .d.n .ti natsgegetan Knappesetan  
nui estas in ,aldegivitite estas toebi el  
S-ro Paul Calise, Parizo.

, ensaas

Kara Samideano,

Responde je via letero de la 17-a la jena:

La kaŭzo, ke s-ro Fournier ricevis apartan malgrandan DAM-karton estas, la ordinara karto de s-ro Fournier estis tute plena de gluitaj brikoj, tiel ke mankis loko por plia briko. Tial s-ro Cseh devis aldoni apartan malgrandan karton.

La ideo de s-ro Thierry estas certe tre interesa, sed la Instituto jam antaŭ du jaroj faris interkonsenton kun UEA pri la aranĝo de seminario antaŭ la UEA-Kongreso. Krom tio laŭ tiu aranĝo ni povas atendi la plej multajn lernantojn.

Estas tamen aliaj solvoj. Eble TEJO povus aranĝi sian kongreson 10 tagojn antaŭ la Universala Kongreso, tiel ke antaŭ la anoj de TEJO povu partopreni en la seminario. Alia solvo estas, ke ili invitu alian tre bonan instruiston, ekzemple s-ron T. Morariu aŭ s-ro Rasmussen. Dupuis, Ambaŭ estas trege spertaj Cseh-metodaj instruistoj.

La adreso de s-ro Morariu estas: Göteborgsvägen 1. RNSKED. Svednio kaj

kaj tiu de s-ro Roland Dupuis: Kubbegetan 13, n.b. ankaŭ en  
Enskede, Svedujo.

Esperante, ke unu el la ideoj estos efektivebla, ni restas kun  
sinceraĵsalutoj,  
samideane,

Kare Samideano,

Responde je via letero de la 17-a de januaro:

Le kerno, ke s-ro Roumier ricevas sberstan malgrandaŭ DVM-karfon estas  
la ordinara kazo de s-ro Roumier estas tute glens de Glutistoj priroj,  
tiel ke manka loko por dia priko. Tial s-ro sen devia ajdoni  
sberstan malgrandaŭ karfon.

La ideo de s-ro Roumier estas certe tre interesa, sed la Instituto jam  
estas en la UEA-Kongreso. Krom tio lan fin streĝo ni povas atendi je piet  
suteĝ la UEA-Kongreso. Krom tio lan fin streĝo ni povas atendi je piet  
multajn jarmojn.

Ŝatas fomen aliaj solvoj. Eble tio povas esti alian kongreson io  
teĝojn sberstan malgrandaŭ karfon. Eble tio povas esti alian kongreson io  
povr portopreni en la seminario. Alia solvo estas, ke ili invitu alian  
kongreson sberstan malgrandaŭ karfon. Eble tio povas esti alian kongreson io

La agreso de s-ro Roumier estas: Götterovarenen i. BARKEDER. Svedujo kaj

Danki's

24-2-1960

Parizo, 18 Feb. 1960

Estimata Sinjoro Cseh!

Post la apero de l'unua ĉi-jara numero de "La Praktiko" mi deziris esprimi al Universala Ligo (pli speciale: s-ino Julia Isbrucker kaj vi) miajn plej sincerajn gratulojn pro la enhavo kaj aspekto de via ŝategata revuo.

Aparte plaĉas al mi la mondfederalecaj ĉefartikoloj kaj la dokumentoj pri nesufiĉe konataj landoj. Vera mondcivitano devas havi konkretajn nociojn pri ĉiuj regionoj por akiri veran plandedecan patriotismon.

Plie, opiniante ke nuraj vortoj ne sufiĉas, sed ke agoj devas konfirmi ilin, mi decidas - ricevinte hodiaŭ la necesan sumon - iĝi ankau Fundamenta Membro.

Ĝar mi antaŭe jam akiris 50 lerikojn, restas al mi 450 lerikoj po unu stelo (aŭ po 0,35 NF), entute 157,50 NF por pagi.

Esperable tio helpos por la kovrado de tiu

vere terura 22%a plialtigo de l' preskostoj.

Mi eĉ opinias, ke pro la generala altigado de la prezoj UL devus fiksi novan abonprezminimumon, ekz. 8-guldenan.

Ĉiukaze mi sendas miajn lertikojn al s-ro Labik, landa reprezentanto de UL.

Mi estas kaj restas konvinkita, ke la vera logika daŭriganto de l' Zamenhofa "interna ideo" estas nur la mondfederalismo, sentata kaj praktikata de Universala Ligo, kaj ~~ne~~ dividon semintaj en la Esperanto-Movado ideologoj, kiuj en pasinta Julio<sup>x)</sup> ne hontis kompari s-ro'n Lech-Walter kun iu germana faŝisto — ion rapide forgesinte, ke la prezidanto de Unio Esperantista Franca estas iama kontraŭnazia "rezistulo", dufoje arestita de la Gestapo! Hundoj kutimas boji...

Sincere salutas,

via Paul Ciliga

x) Vidu tiunokatan numeron de "SAT-Amikaro".

# UNION ESPÉRANTISTE FRANÇAISE

FONDÉE EN 1898

BUREAUX OUVERTS  
TOUS LES JOURS  
de 9 h. à 12 h. et de 14 h. à 18 h.  
sauf DIMANCHES et MARDIS

SIÈGE SOCIAL :  
34. RUE DE CHABROL  
PARIS (10<sup>E</sup>)

TÉL. PRO. 55-03  
MÉTRO : GARE DE L'EST  
C. C. P. PARIS 855.35

Al la Redakcio de "La Praktiko"  
Riouwstraat 172  
Den Haag, Nederlando.

Parizo, la lan de Oktobro 1960

Estimataj Samidealanoj!

Kun granda plezuro mi rimarkis en la Septembra N<sup>o</sup> (275, p.128) de via alte ŝatata kaj ĉiam aprezata revuo, ke vi honorigis mian plumon, citante la plej gravan paragrafon el mia lasta letero antaŭferia; espereble la aliaj legaĵoj facile komprenos, kiun mi intencis kritiki per la vorto "ideologoj". Precipe en Francio la Esperanto-Movado suferas pro iuj personoj, kiuj plej ofte tute senkonscie subfosas niajn klopodojn, kompromitante ĝin antaŭ la publika opinio (almenaŭ granda parto) kaj la publikaj aŭtoritatoj, kiuj jam per si mem apriore ne ĉiam havas ĝustan opinionon kaj justan komprenon pri nia agado.


Pri mia fundamenta membriĝo mi ree atentigas, ke mi ne ricevis ĝis nun ajnan konfirmon pri la ricevo de l'koncerna kotizo, nek rimarkis informon inter la oficialaj komunikoj de U.L., nek ricevis la koncernan nombron da gluotaj brikoj por kompletigi ĝis 500 la jam akiritajn antaŭe. Bonvolu, mi tre petas, ne forgesi tion.

Nun mi aldonas komunikon por la rubriko "Kion faras la liganoj":

"S-ro Paul Ciliga, DAM de UL, Vic-Prez. de STELO, en la kadro de la Internaciaj Kulturferioj de la Esperantista Kulturdomo Grésillon (Baugé, Francio) prelegis la 23.VII.60 pri "Estonta evoluo de l'Esperanta vortfarado per kvazaŭafiksoj", montrante la vojon de l'interna riĉiĝo kaj plinuanciĝo de nia lingvo per sistemo, parta normigo kaj konscia senbalastigo kaj trakribo de nia vorttrezoro."

Sincere salutas,

via



Paul Ciliga

17, Rue Duguay-Trouin, Paris VI<sup>e</sup>, Francio

TOUT HOMME DOIT SAVOIR DEUX LANGUES : CELLE DE SON PAYS ET L'ESPERANTO

ĉi tiu ĉi estas la unua ekzemplaro de la nova  
membroj.

LA CENTRE MONDIALISTE EN PARISO  
Kaj ni volonte en la 1968-aj jaroj  
ni ni en la 1968-aj jaroj.

Al s-ro Paul CILIGA,  
Parizo.

Kara samideano!

Hodiaŭ alvenis en Hagon s-ro Guillaume kaj memorigis min,  
ke vi ankoraŭ atendas de mi la glukvitancetojn. Fakte mi jam  
antaŭ longe, tuj post la Brusela Kongreso, pretigis ilin kaj  
intencis forsendi al vi, sed en tiu tempo pro subita forvo-  
jaĝo devis prokrasti, kaj poste la supermezura laboramasiĝo,  
kiu jam tro multe ŝarĝas min, kaŭzis pluan prokraston. Mi tre  
bedaŭras kaj petas vin, amike indulgi. Ci tie nun mi sendas  
al vi la glukvitancetojn kaj ripete esprimas al vi profundan  
danksenton ankaŭ en la nomo de la ceteraj estraranoj pro via  
nobla kaj vere kortuŝa gesto subteni nian Ligon per tiel mul-  
taj brikoj en la formo de la fundamenta membreco.

Mi havas de vi ankoraŭ iujn raportetojn pri viaj propagandaj  
paŝoj. Parto jam aperis en La Praktiko, sed mi volas aperigi  
ankaŭ la ceterajn, kvankam ili estas jam sufiĉe malnovaj, sed



56, Rue d'Assas, Paris VI°

17-VI-1961

Estimata Sinjoro Cseh!

Kun granda plezuro mi ricevis pasintan monaton la glukvitancetojn en via lasta letero, pro kiu mi multe dankas al vi. Ankaŭ la raportetojn, kiujn mi siatempe estis sendinta al vi, kun kontentiĝo mi vidis en la du lastaj numeroj de "la Praktiko"; tamen mi nepre devas atentigi vin pri unu fakto, nome ke ĝis nun aperis neniu oficiala informo de Universala Ligo por anonci, ke mi iĝis Fundamenta Membro, kaj sekve iuj legantoj povas miri pri la literoj FM, kiujn vi aldonigis antaŭ DAM. Bonvolu, mi tre petas, ordigi ankaŭ tiun ĉi punkton, kaj tiam la afero estas definitive solvita. Antaŭ ol fini necesas ankoraŭ, ke mi atentigu la administracion pri adres-ŝanĝo; efektive eke de nun mi ne plu loĝas 17, Rue Duguay-Trouin, sed ja 56, Rue d'Assas. Tamen, ĉar mi nun reprenis la redakcian sekretariecon de Franca Esperantisto, materialon por tiu gazeto oni sendu ne al mia privata adreso, sed al 34, Rue de Chabrol, kompreneble.

Sincere salutas kaj bondeziras,

via

Paul Ciliga



Hago, 1-VIII-1961.

Al s-ro Paul CILIGA

Parizo.

Kara samideano!

Mi dankas pro via letero de la 17-VI kaj povas sciigi vin, ke via fundamenta membreco estas regule notita. En La Praktiko la informo pri tio aperas en la proksima publikigo de "Oficialaj Komunikoj de UL". Tiuj komunikoj aperas de tempo al tempo, kiam sufiĉa materialo kolektiĝis.

Kun koraj bondeziroj por via somera libertempado kaj por viaj bonegaj laboroj en la movado, mi salutas vin

samideane kaj amike,

Al s-ro P. CILIGA, Parizo.

Hago, 6-III-1962.

Kara samideano!

Kun plezuro ni sciigas vin, ke hodiaŭ ni forsendis al via adreso omagan ekzempleron de la ĵus fabrikita "kolekta bindilo" de La Praktiko, en neregistrita presaja paketo, por vi persone kiel ŝatata fundamenta kaj dumviva aktiva membro de nia Ligo.

Por plenigi la paketon (la skatolon) ni enmetis 2 ekz-ojn de la libro AKBAR por la libroservo de UEF. Ĉar ni aŭdis, ke vi kunlaboras kun la oficejo de UEF, ni esperas, ke vi bonvolos kaj facile povos transdoni la du librojn al la oficejo de UEF. Koran dankon pro ĉi tiu helpo! La fakturon ni sendos rekte al UEF kune kun aliaj libroj, kiujn ni nun sendas plenumante la lastatempajn mendojn de UEF.

Cetere ni nun febre laboras por enskribi la nun-jarajn abonojn kaj dissendi la januaran numeron de La Praktiko. La februara numero estos presata post kelkaj tagoj.

Kun koraj bondeziroj kaj amika saluto,